

La Progreso

REDACTIE-COMITE

G. P. DE BRUIN

G. J. DEGENKAMP

W. F. KRUIT

STUDIEBLAD VAN DE BOND

VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN

IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

f 2.- per Jaar: f 1.50 voor leden van F.L.E.

Postgiro 331133

H. KUYT

JAC. LEM JR.

J. VAN SCHEEPEN

H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

PRI GUSTOJ ONI NE DISPUTU!

Feliĉe ĉiuj homoj ne havas la saman guston. Se tiel estus, la vivo estus terure monotona. Se ni ĉiuj povus aranĝi la vivon laŭ persona gusto, ni konstatus ankoraŭ multe pli da diferencoj en la mondo: diferencaj domoj, vestoj, vivmanieroj k.m.a. Liberan esprimadon de gustoj multe bremsas unue la praktiko, due la socia devigiteco, trie konvencio.

Diferenco de gustoj esprimiĝas ankaŭ en la lingvo: en frazkonstruo, elekto de vortoj, vortformado, prefero pro specialaj gramatikaj formoj k.t.p. El tio rezultas, ke ĉiu aŭtoro havas sian propran stilon kaj preferatan vortelekton. Estas kompreneble, ke la stilo kaj vortelekto, kiuj plaĉas al unuj, povas malplaĉi al aliaj. Same en la ĉiutaga vivo. Al mi plaĉas, ke la tablo staras en la mezo de la loĝĉambro, kvankam mia najbaro metis ĝin antaŭ la fenestro. Al mi tio malplaĉas, sed vizitante lin mi certe, pro ĝentileco, tion ne diras al li. Tamen, se li metus sian fornon en la mezo de la ĉambro aŭ farus alian sensencan aranĝon, mi sentus inklinon diri tion, ĉar li agus ne praktike kaj kaŭzus ĝenon al siaj vizitantoj.

Tiun bonmanierecon: silenti pri alia aranĝo laŭguste, ni ankoraŭ devas lerni en Esperanto. Konstante ja montriĝas, ke ne ĉiu recenzisto komprenas ĝin. En Esperanto ne ekzistas — kiel ĉiu ja scias — tradicie fiksitaj leĝoj, kiajn havas la naciaj lingvoj. Pri diversaj tiaj gramatikaj formoj, pri vortoj, kunmetaĵoj k.a. la aŭtoroj estas plene liberaj. Ĉiu rajtas eksperimenti novaĵojn kaj ne bezonas sin senti ligita al tio, kion alia instruas aŭ diktas. La estonteco pruvos kion la evoluo akceptas kaj kion ne. Ni nunfoje ne diskutu pravon aŭ mal-

pravon de iuj formoj aŭ vortoj; ni nur atentigu pri troigita, preskaŭ fanatika fervoro kontraŭ formoj, kiuj al iuj ne plaĉas. Ĝisnue oni povas legi kritikojn kontraŭ la indikativo post „kvazaŭ“, kontraŭ „io“ por landnomoj, kontraŭ „dum kiam“ kaj „ĝis kiam“, kontraŭ uzo aŭ neuzo de akuzativo en specialaj kazoj. Se temas pri efektiva eraro, la kritikanto pravas. Sed jam ofte pruvigis, ke tiaj aferoj estas logike kaj lingvistike defendeblaj, do permeseblaj en Esperanto. Eĉseption oni eble povas fari pri „io“, kvankam tio estas alero nur de la evoluo. Pri ĝi ni ne diskutu!

Ni akcentas nur, ke ĝenerale oni ne povas decidargumenti kontraŭ la kritikitaj formoj, Kaj pro tio la argumentoj anstataŭas esprimoj de malplaĉo: ke tio aŭ alio estas malbela. Tio ne estas racia. Se io ne trovas nian personan plaĉon, kaj ne estas kontraŭ regulo aŭ praktiko, ni ne montru malplaĉon, sed silentu pro ĝentileco aŭ pro respekto al la kontraŭa opinio de iu aŭtoro. Ni ankaŭ konsciuj, ke ne nur konstanta defendado de iu lingva formo finfine komencas tedi, sed ke tudas ankaŭ senĉesaj kritikoj kaj esprimoj de malplaĉo pri tio, kion aliaj preferas. Ni lasu la decidon al la praktiko kaj la evoluo; nur ili akceptos aŭ forjetos, ne demandinte pri niaj plaĉoj aŭ malplaĉoj.

Kaj kion ni diru pri gramatikistoj, kiuj kondamnas unu formon, sed pasie defendas alian. En tio konsistas vera danĝero, ĉar tio konfuzas studentojn, kiuj fine jam ne scias al kiu konfidi.

Ni memoru la supre ekzemplitan najbaron. Se la loko de lia tablo montriĝos pli praktika ol ĉe ni, ankaŭ ni eble ĝin metos antaŭ la fenestron.

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Het voorzetsel DA.

Een zelfstandig naamwoord kan geen rechtstreeks verband hebben met een ander zelfstandig naamwoord. Een bijvoeglijk naamwoord en een telwoord kunnen dit wel, bijv.: *agrada tago, cent homoj*. In het Nederlands zegt men: *een emmer water, een wagon hout, een glas melk*. Hier heeft een zelfstandig naamwoord rechtstreeks betrekking op een ander zelfstandig naamwoord. Dit kan in Esperanto dus niet. De woorden zouden naast elkaar staan, zonder dat er van enig verband sprake is, bijv.: *sitelo akvo, vagono ligno, amaso homoj*. Een voorzetsel geeft een betrekking weer tussen twee zelfstandigheden, bijv.: *la mono de* (voorz.) *riculo, la seĝo antaŭ* (voorz.) *la tablo*. Zo'n betrekking kan van verschillende aard zijn, zo drukt „de” in ons voorbeeld, een betrekking van bezit uit en „antaŭ” een betrekking van plaats. Men kan ook een betrekking van hoeveelheid of maat uitdrukken, hiervoor gebruikt men dan het voorzetsel „da”, bijv.: *sitelo da akvo, vagono da ligno, glaso da lakto*. „Da” brengt dus de betrekking tot stand tussen een zelfstandig naamwoord dat een hoeveelheid of maat noemt, en een zelfst. naamw. dat een onbepaald geheel noemt. Niet altijd noemen woorden als „sitelo, vagono, glaso” enz, een hoeveelheid of maat; men kan zeggen: *sitelo por lakto* — een emmer voor melk (melkemmer), *glaso de lakto* — een melkglas, *vagono kun ligno* — een wagon met hout. Voorbeeld: *Ĉu vi aĉetis multe da konstrumaterialo? Ne, nur unu vagono da ligno. Kie estas la maŝinisto? Li staras apud la vagono kun ligno*. De betekenis van de zin zegt ons, of er sprake is van een hoeveelheid of maat. Nog enige voorbeelden: *Mi vidis aron da anseroj* (.... *dekon da knaboj*). *La patro aĉetis funton da tabako* (.... *kvanton da poŝtmarkoj*). *Li vendis paron da ŝuoj* (*litron da lakto*). *Milionoj da homoj suferas. Monato estas parto da tempo*. „Da” is een voorzetsel en wordt gevolgd door de eerste naamval (dus geen N). Ook een bijwoord kan geen betrekking hebben op een zelfstandig naamwoord. Om een betrekking uit te drukken tussen een bijwoord en een zelfst. naamw. gebruikt men „da”, bijv.: *Li posedas kelke da libroj. Li konas multe* (*malmulte*) *da*

eksterlandanoj. Mi bezonas pli (*malpli*) *da mono*. De correlatieven die uitgaan op „iom” zijn ook bijwoorden: *La afero ne valoras tiom da peno. Donu al mi iom da akvo*.

Ter vertaling:

Ons studieblad „La Progresanto” heeft veel abonné's nodig. Heeft U veel exemplaren van „La Progresanto?” Ik bezit slechts een jaargang ervan (= van hen). De man kocht een dozijn potloden voor zijn zoon. Ik heb drie meter stof nodig. Welke stof wenst U? Geef mij een stuk van deze stof. Een tiental mannen ging de tuin in. Duizenden mensen leerden reeds Esperanto. Heeft U nog geld nodig? Geld heb ik genoeg. De koopman verkocht twintig paarden. De rijkard bezit een miljoen gulden.

Vertaling van opgave 12.

Helpate 1) de kelkaj amikoj, li plenumis 2) la malfacilan 3) taskon. Kriante, li forlasis la salonon. Kiam Johano venis hejmen 4), la 5) patro jam kuŝis 6) en la 7) lito. Ironte 8) hejmen, la knabo aĉetis libron. Trovinte la libron, mi donis ĝin al Johano. Ridante, la knaboj iras en la ĝardenon 9). Manginte, la viro iris hejmen. Punite de 10) la instruisto, la knabo plorante iris hejmen. Enirante, la infano ĝentile salutas ĉiujn.

1) Ook: *helpite*; de Ned. zin laat ruimte voor twee betekenissen. 2) Niet: *finiĝis*; bedoeld wordt *finis* (*fini* is een overgangelijk werkwoord, bijv.: *li finis la laboron*, maar: *la laboro finiĝis*) maar *fini* is niet de juiste vertaling voor het Ned. woord *volbrengen*. 3) Ook: *pezan*. Niet: *gravan*; een zware taak kan ook wel onbelangrijk zijn. 4) Niet zonder richtings N; *hejmen* is een bijwoordelijke uitdrukking voor *en la hejmon*. Niet: *Venante hejmen, la patro*....; d.i. toen vader thuis kwam, lag hij (zelf) al in bed. Onzin dus. Een bijwoordelijk deelwoord vervangt een bijzin, welke dezelfde persoon tot onderwerp heeft als de hoofdzin. Zulke zinnen moet men eerst ontleden. 5) Ook zonder lidwoord, maar dan krijgt *Patro* een hoofdletter, omdat het dan als eigennaam wordt beschouwd. 6) Ook: *estis*. Niet: *estis kuŝigita*; dit is een onmogelijke vorm, *kuŝi* is een onovergangelijk werkwoord en natuurlijk ook *kuŝigi* (alle woorden op *igi*). Een onovergangelijk werkwoord kan niet uitgaan op: *ate(a), ite(a) of ote(a)*. Niet: *enlitiĝis*; dit stelt de handeling voor als aan de gang zijnde op een tijd in het verleden (bij het binnenkomen). Wel: *estis enlitiĝ-*

GAAN WIJ DOOR!

Onze werfactie heeft succes gehad! Dank zij de ijverige medewerking van een aantal afdelingen, zijn we er in geslaagd niet alleen het beslist nodige aantal van 1500 abonné's te halen, maar dat zelfs met een honderdtal te overschrijden. Aan alle medewerkers onze hartelijke dank!

Dit is de eerste stap!

Nu de tweede, d.w.z., in deze maand moeten ook de abonnementsgelden voldaan zijn. Kunnen we ook hierop rekenen? Zo ja, dan gaan wij door! Administratie

SUBJEKTO KAJ PREDIKATO

Kiel multaj, ankaŭ tiuj ĉi terminoj originas de la fama antikva filozofo Aristotelo (284a—322a a.K.). Li estis la unua, kiu sistemigis la tuton de nia kono, do ankaŭ la manieron kiel ni akiras konon (epistemologio). En tiu filozofia branĉo li malkovris kiel rezonmanieron la silogismon: ĉiuj homoj devas morti (1); Sokrato estas homo (2); do Sokrato devas morti (3). Ĝi estas la fundamenta leĝo de la rezonado.

Sed, ĉar silogismo enhavas ankoraŭ tri propoziciojn, li analizis ankaŭ ĉiun propozicion. Ĉiuj homoj devas morti = ĉiuj homoj estas mortidevaj. La virino trikas = la virino estas trikanta. Do, ĉiu propozicio konsistas el *du* partoj. La unua estas parto de la tuta realo (ĉiuj homoj, Sokrato, la virino). Ĝi estas la subjekto. La dua parto estas eco de la unua (mortideva, homo trikanta). Ĝi estas la predikato (= kromdiraĵo). La rilaton inter la subjekto kaj la predikato li nomis *juĝo*. Subjekto kaj predikato estas ambaŭ *ideoj*.

Aristotelo estis ne nur filozofo, sed ankaŭ sciencisto: biologo kaj lingvisto. Ankaŭ tie li analizis kaj sistemigis. Ankaŭ la lingvon. Kaj estas kompreneble, ke li uzis la produktojn de la filozofia laboro. Tiel li analizis ankaŭ la *frazon*: ĉiuj homoj estas mortidevaj — en la samajn partojn: subjekto — predikato. Restas tamen la vorto „estas”. En la filozofio ĝi ne estas grava, almenaŭ ne en ĉi tiu formo. Tie ja temas pri juĝopartoj, en la lingvistiko pri frazpartoj; kaj en la frazo ĉiu *vorto* rilatas kun alia vorto. Por la filozofio ekzistas nur du ideoj en

ĉiu frazo: ĉiuj homoj — estas mortidevaj. Sed por la lingvistiko la supra enhavas jam kvar vortojn, kiujn ĝi celas sistemigi. Kaj ĝi sukcesis ĝis nun nur parte. Ke „ĉiuj” estas pliprecizigo de „homoj”, ĉiu komprenas. Sed: „estas mortidevaj”; kio estas la ĉefa vorto? La filozofio atestas por „mortidevaj”. Sed kiun nomon oni donu al la parto „estas”? Ofte oni tiukaze uzas la terminon *verbum finitum* (verbo konjugaciita). Tio ŝajnas al mi tre neprudenta, ĉar oni intermiksas vortspecon (verbo) kun frazparto (predikato). Komparu en P.V.: Subjekto: persono aŭ objekto, kiu faras la agon aŭ suferas la staton esprimatan de la *verbo*. La lingvistiko analizas ja ne nur laŭsence (frazparto), sed ankaŭ laŭforme (vortspeco). Ekz. la frazon „la patro legas la gazeton” ni povas laŭsence analizi en tri partojn: „la patro” = subjekto; „legas” = predikato (komparu filozofian: estas leganta); „la gazeton” = komplemento; „la” komplementas „patro” kaj „gazeton”. Laŭforme „la” = adjektivo; „patro” kaj „gazeton” = substantivoj; „legas” = verbo.

Intermiksi ilin estas nek lingvistike nek filozofie. Oni ankaŭ ne diras, ke „homoj” estas subjekto, sed nepre „ĉiuj homoj”. Tiel la predikato en la lingvistiko nepre estas „estas mortidevaj”. En la frazo „hieraŭ la infanoj aŭskultis belan rakonton de la avino” eĉ la tuta frazo ekster „la infanoj” estas principe predikato. Sed kiel la subjekton, ni povas pli analizi ankaŭ tian predikaton en komplementojn, objektojn k.t.p. Tiel ankaŭ en la frazo „la rozo estas bela” „estas bela” = predikato; „estas” = verba parto; „bela” = adjektiva parto.

El la ĉi supre dirita oni komprenas, ke la konfuzon pri la termino „predikato” ne kaŭzis la francoj, sed nur sufiĉe multaj nefilozofiaj filozofiuoloj. Post esploro ĉe kelkaj diversnaciaj lingvistoj mi trovis la intermiksion ankaŭ ekster Francio kaj ĉe francoj klaran komprenon.

Uzo de ĉi tiu metodo (predikato estas esence la tuta frazo ekster la subjekto, kaj poste ambaŭ partojn analizi) ŝajnas al mi rekomendinda. C. Bruins.

inta. 7) Ook: *sia* (hoewel men dan zeker moet zijn dat de man in zijn eigen bed ligt). 8) Ook: *antaŭ ol la knabo iris hejmen...* Niet: *venonte*; d.i. voordat de jongen in huis komt. 9) Niet zonder richtings N. 10) Niet: *per*, d.i. door middel van.

Beoordeling: J.R. te A. 10, L.H.P. te R. 9, G.A. te R. 10, A.A.D. te Z. 9, C.v.B. te S. 9, J.R. te A. 6, R.M. de V. te Z. 8, Astor 9, A.B. te A. 9.

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem

In deze en volgende rubrieken zullen wij trachten uitdrukkingen te verwerken, die in het dagelijks leven wel eens voorkomen en die in de regel niet voor woordelijke vertaling vatbaar zijn. Leert deze uitdrukkingen van buiten; zij zullen u ongetwijfeld te stade komen. Vele uitdrukkingen zullen ook op andere wijze vertaald kunnen worden. De voorbeelden die wij geven, zijn ontleend aan verschillende auteurs, o.w. in de eerste plaats Dr. Zamenhof.

Zich met een Jantje van Leiden van iets afmaken.

Van mening verschillen.

Alle perken te buiten gaan. De spui-gaten uitlopen.

Beetnemen.

Onder mijn ogen komen.

Door schade en schande wordt men wijs. Iemand van dienst zijn met.

Voorkomen is beter dan genezen.

Iemand te glad af zijn.

Weer opknappen.

Dat laat ik niet over mijn kant gaan.

Wat scheelt er aan?

Flink de les lezen.

Liever niet moeten doen.

Liegen, alsof het gedrukt staat.

St. Juttemis.

Het komt mij voor.

Opgave 2. Vertaal in Esperanto:

1. Hij trachtte mij beet te nemen, maar ik was hem te glad af. 2. Waarde vriend, waarmee kan ik je van dienst zijn? 3. Tracht je (nu) niet met een Jantje van Leiden overal van af te maken en alles uit te stellen tot St. Juttemis. 4. Dat wij van mening verschillen, kan ik begripen, maar dat je mij beledigt, laat ik niet over mijn kant gaan. 5. Als die schurk onder mijn ogen komt, zal ik hem (eens) flink de les lezen. 6. Armoede is geen schande, maar zij is vaak zeer lastig. 7. Neen, maar dat gaat alle perken te buiten (dat loopt de spui-gaten uit), je liegt, als of het gedrukt staat! 8. Beste kerel (**kara mia**), wat ben je bleek! Wat scheelt er aan? Ben je ziek geweest? Ja, ik ben erg ziek geweest, maar nu knap ik langzamerhand weer op. 9. Wees niet ongeduldig, als gij niet dadelijk slaagt: door schade en schande wordt men wijs. 10. Het komt mij voor, dat gij dit liever niet moest doen; voorkomen is beter dan genezen.

Vertaling van opgave L

LA PARABOLO PRI LA ELEFANTO

Kelke da monaĥoj diskutis pri teologiaj problemoj. Rajao Ananda demandis al

Liberiĝi (liberigi sin) de io per penso.

Ne samopinii. Ne havi la saman opinion. Superi (transiri) ĉiujn limojn.

Trompi.

Veni antaŭ miajn okulojn. Renkonti.

Post domaĝo venos saĝo.

Esti utila al iu per.

Pli facile estas malbonon eviti, ol korekti. Pli bone estas ne fari, ol erari.

Superruzi iun.

Refortiĝi.

Tio ne pasos por vi senrezultate. Tion mi ne toleras.

Kio estas al vi?

Fari solidan moralinstruon. Severe riproĉi.

Prefere ne fari.

Mensogi kiel kalendaro (gazeto). Mensogi tiel, ke la muroj krakas.

Sankta Neniamo.

Sajnas al mi.

Budao, kiu el ili estas prava (pravas). Budao respondis, rakontante jenan parabolon:

En la sama urbo Savatthi, kie ni nun troviĝas, vivis iam iu rajao.

La rajao veniĝis iun viron kaj ordonis al li kunvoki ĉiujn blindnaskitojn al Savatthi.

„Bonege, sinjoro”, la viro respondis kaj obeante la rajaon, li kunvokis ĉiujn blindnaskitojn, post kiam li sciigis al la rajao: „Sinjoro, ĉiuj blinduloj, kiuj troviĝas en Savatthi, ĉeestas.”

„Montru al tiuj blinduloj elefanton.”

La viro diris: „Blinduloj, jen (estas) elefanto.” Al unu el ili li palpigis la kapon de la besto, al alia oreton, al ankoraŭ aliaj la dentegojn, la rostron, la krurojn, la dorson, la voston kun la hartufo, ĉiufoje dirante: „Ĉi tio estas elefanto.”

Tiam tiu viro iris al la rajao kaj diris al li: „Sinjoro, mi montris al la blinduloj la elefanton; aĝu laŭ via bontrovo.”

La rajao iris al la blinduloj kaj demandis al ĉiu el ili, ĉu li vidis la elefanton.

Ĉiuj respondis: „Jes, sinjoro!” „Rakontu al mi, blinduloj, kia objekto estas elefanto.”

Tiu, kiu palpis la kapon, diris: „Sinjoro,

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen

Vertalingen zende men in vóor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 2; vertaal in Esperanto:

OVER HET LEZEN VAN BOEKEN

Er wordt in de laatste jaren méer gelezen dan ooit. Maar wordt er ook bétér gelezen?

Evenmin als bij welke andere zaak ook, komt het bij het lezen aan op de hoeveelheid. Er zijn kleine boeken, die een onuitputtelijke schat van wijsheid en schoonheid bevatten en er zijn romans in vier of acht vervolgdelen, waarvan niemand iets anders ondervindt, dan een simpele tijdpassering. „Wie leest, verkrijgt zijn geest”, zegt men; doch die uitspraak is enkel waar onder veel voorbehoud. Immers, wie rijp en groen verslindt, verliest ten slotte elk onderscheidingsvermogen, hij bederft zijn smaak en overlaadt zijn maag. Goed lezen, is niet slechts aandachtig lezen, ja, kritisch lezen; het is bovendien: datgene uitkiezen, dat waarlijk de inspanning en de tijd waard is. Zonder inspanning geen verrijking. Of dacht men, dat kunstenaars kunnen, wat ter wereld niemand kan: iets schenken zonder dat men bij de ontvangst het offer van zijn aandacht brengt? Er is inzake boeken maar één gebod: lees het goede boek goed.

Dr. G. Stuiveling.

Vertaling van opgave 15.

Kiel ĝenerale agnoskita 1) kristana festotago la kristnaska festo 2) estas multe pli nova 3) ol Pasko kaj Pentekosto. Jen, ni devas tamen konstati 4), eble bedaŭre 5) al multaj, ke la maskigdato de Kristo estas tute nekonata. Ankaŭ la jaro en kiu ĝi okazis estas divinebla 6) nur laŭ akcesoraj cirkonstancoj. Ĉiu-

elefanto similas al barelo." Kaj tiu, kiu palpis nur la oreton, respondis: „Sinjoro, elefanto similas al ventokorbo.” Tiu, kiu palpis la dentojn, diris, ke la elefanto similas al soko (plugfero; sed tiu, kiu palpis la rostron, diris, ke ĝi pli similas al plugilo. Aliaj nomis la elefanton grenejo, ĉar ili palpis la ventron; ankoraŭ aliaj, kiu palpis kruron, opiniis, ke ĝi estas kolono; kaj tiu, kiu palpis la voston, certigis, ke ĝi estas ŝnuro aŭ balailo.

Tiam ili komencis kvereli (disputi) kaj kriegi: „Estas kiel mi diris!” „Ĉi nenion komprenas pri tio!” „Elefanto tute ne

(o)kaze estas certe 7), ke tio ne okazis 8) la 25an de decembro de la jaro nula 9). La intereso de la unuaj kristanoj por tio ne estis tre granda. Ili pli multe akcentis 10) la fakton de la reviviĝo 11). Ja ĉiujare 12) naskiĝis miloj da infanoj; tio ne estis tre 13) rimarkinda. Sed 14), ke iu venkis la morton kaj revenis 15) el la tombo pli multe impresis kaj (tio) estis pruvo de la Dieco de Kristo. La malnova kristana religio unuigis sin preferi 17) ĉirkaŭ la malfermitan tombon ol ĉirkaŭ la trogliteton. Se oni tamen nomas datojn 19) de la naskiĝo de Kristo, oni lokigas ĝin ofte en la printempo: la 28an de marto, la 3an de aprilo, la 20an de aprilo, la 20an—21an de majo.

„Olie”, Dec. '47.

1) Ook: *rekonita*. 2) Ook: *Kristnasko*. 3) Ook: *antikva, juna*. Men zou kunnen spreken van „malpli nova”. 4) Niet: *fiksi*. Ook: *rimarkigi*. 5) Liever niet: *je la bedaŭro*. Ook: *senluziigo*. 6) Ook: *supozebla, deduktebla, derivebla*. 7) Ook: *fiksitate, neduble, neskeueble*. 8) Ook: *estis*. 9) Ook: *Oa*. Een inzonder merkt op, dat het jaar 0 eigenlijk niet deugt, daar men niet kan tellen met jaren vóor het begin. Hij vertaalde: *de la jaro antaŭ la komenco de la kristana erao*. 10) Ook: *reliefiĝis, emfazis*. 11) Ook: *rezurekcio* (niet officieel). 12) Ook: *ĉiun jaron*. 13) Ook: *tiom*. 14) Ook: *sed, la fakto, ke*. 15) Niet: *denove revenis*. Het terugkeren geschiedde slechts eenmaal. 16) Niet: *preĝejo*. 17) Ook: *pli multe*. 18) De vertaling „manĝujo” of slechts „liteto” voldoet niet, daar hier vooral „kribbe” een historische betekenis heeft. 19) Geen woordelijke vertaling.

Beoordeling: Fuŝulo: 8; Astor 7; Grizulino 7; J.T. te Dev. 6; F.v.d.M. te U. 6; P.W. te Gr. 5; A.D. te Z. 6; A.L. te G. 8; P.R. te G. 7; A.B. te A. 7.

estas tia!” „Tia ĝi certe estas!” Tiam ili komencis insulti (ofendi) kaj malbeni unu la alian (sin reciproke), ĝis kiam finfine ili komencis interbatali. „Tiam, monaĥoj, tiu rajao ĝojis pro (pri) tio, kion li vidis.”

Beoordeling: L.H.P. en R.: 8; P.M.W. en G.: 6; C.v.E. en R.: 7; J.R. en A.: 8; G.A. en R.: 8; J.M.T. en D.: 9; H.M.B. en R.: 8.

ESPERANTO-EKZAMENOJ.

Prospekton pri la ekzamenoj en 1949a ni sendos senpage al ĉiu petinto.

DE EXAMEN-VAKKEN

6. DE CONVERSATIE

Voorheen was de conversatie een afzonderlijk examenvak. Sinds verleden jaar is dit gedeelte samengevoegd met kennis van beweging en geschiedenis, hoewel voor conversatie een afzonderlijk punt toegekend wordt. Men moet dit deel van het mondelinge examen dus zó opvatten, dat de candidaat een aantal vragen in Esperanto te beantwoorden krijgt, waaronder vragen betreffende geschiedenis en beweging. Uit de aard der zaak zullen de antwoorden op de laatste vragen niet uitvoerig zijn, en voor de examinerator dikwijls niet toereikend om de bekwaamheid van de candidaat in het spreken te beoordelen. Om dat wél te kunnen, moet de examinerator ook andere vragen stellen, die van verschillende aard kunnen zijn en zelfs geen betrekking op Esperanto behoeven te hebben. Hij zal de candidaat gelegenheid geven om zich vrij te uiten, het initiatief min of meer aan deze overlatend. Van deze gelegenheid make de candidaat een ruim gebruik. Hij moet tonen, dat hij een zekere vaardigheid in het spreken bezit en grijpe daarom elke welkome vraag aan om van zijn bekwaamheid in een wat uitvoeriger antwoord blijk te geven. Hij moet bedenken, dat antwoorden als „jes” of „ne” e. d. hem in geen geval een gunstig punt kunnen verschaffen, ook al zijn

zij correct, omdat het onmogelijk is daarnaar de bekwaamheid in het spreken te beoordelen.

Maar nu: Hoe moet men zich in het spreken bekwamen? Meestal heeft men daarvoor wel gelegenheid op cursussen of conversatieavonden. Zo niet, dan volg men deze weg: leest eenvoudige tekst enige malen luid voor uzelf en tracht die daarna uit het hoofd te herhalen. Daarbij luistere men naar zijn eigen stem en verbeelde zich alsof een ander sprak. Deze methode heeft beslist succes. Hoofdzaak is hier volharding.

Tenslotte is er een zekere durf nodig om aan een gesprek deel te nemen, omdat men in de beginne nog te veel naar woorden moet zoeken. En daarenboven wordt de beginner beheerst door een zekere vrees verkeerde grammaticale vormen te gebruiken. Die vrees moet men laten varen. Bedenkt, dat zelfs de beste sprekers in hun rede grammaticale fouten maken. Luistert maar eens naar een voordracht in het Nederlands, vooral als het een improvisatie is, voor de microfoon bijvoorbeeld. Als alle sprekers zich van hun taalvormen en stijl bewust waren, zouden vele geen woord meer in het publiek durven zeggen. Onthoudt dus dit: het examen kent wel een punt toe voor conversatie, maar niet voor welsprekendheid!

JARCENTO — CENTJARO

En Esperanto oni ĝenerale akceptas la regulon, ke en kunmetitaj vortoj la ĉefa radiko staras en la fino, kaj ke ĉiu antaŭiranta radiko difinas la tuj sekvan-tan, sed ne inverse. El tio rezultas, ke „jarcento” estas unue „cento”. Kia cento? Karakterizita per „jar”, do: „cento da jaroj”, nederl. „eeuw”. Malgraŭ tiu facilaj regulo oni trovas ĉe Zamenhof, Privat, Kalocsay k.a. ofte la inverse kunmetitan vorton „centjaro”. Pro kio? Ni konjektas, ke Zamenhof ĉe tio lasis sin gvidi de la slava formo (laŭvorte: „centjaraĵo”). Tiu formo tamen ne estas imitinda, ĉar ĝi povus kaŭzi konfuzon kaj konflikto kun ĝenerale akceptita regulo. En „Plena Gramatiko” Kalocsay tamen defendas tiun inversan vortkonstruon, ĉar ekzistas ankoraŭ kelkaj similaj kunmetaĵoj: „tripiedo, tridento, triangulo” k.s. Lian dialektikan eksplikon ni tamen preferu ne akceptu, ĉar verdire ĝi servas nur por havigi regulojn por neregu-

lajoj, aliavorte: motivi nekorektaĵojn. Se ni akceptus ĝin, ni rajtus formi laŭ lia regulo vortojn sensencajn kiaj „duhomo” (homparo), „centhomo” (cento da homoj), „dulitro, dekcento” k.s. Prefere ni konsideru tiujn kontraŭregule formitajn vortojn kia „tripiedo” kiel esceptojn laŭtradicie aŭ konvencie uzeblajn, ĉar ili estas malfacile anstataŭigeblaj per vortoj pli trafaj. „Tripiedo” fakte signifas tripiedaĵon (= aĵo kun tri piedoj), sed ne trion da piedoj.

Iu el niaj legantoj, kiu supozeble akceptas la ĉi supran klarigon, tamen mire demandas: Kial do ni ne diras, analoge al „jarcento”, ankaŭ „jarkvarono”? La lasta vorto ja ne signifas jaron, sed kvaronon. Kian kvaronon? De jaro.

Tiu rezono estas ĝusta. Tamen, ĝi ne ekskludas la formojn „kvaronjaro”, kiu estas same bona kaj ne analoge al „centjaro”. „Kvaronjaro” estas gramatike (ne logike!) jaro. Kia jaro? Kvarona. Do

HOE KAN MEN HET IN ESPERANTO ZEGGEN!

Velen onzer lezers zullen zich nog wel onze rubriek van voor de oorlog herinneren onder bovenstaande titel. Aan deze rubriek kan iedereen medewerken, door treffende uitdrukkingen uit de literatuur te verzamelen met passende vertalingen. Wij beschikken thans over een aantal dergelijke zinnen, verzameld door de heer M. E. Nawijn. Van tijd tot tijd zullen wij daarvan enige publiceren.

De achter de zinnen geplaatste letters geven de werken aan, waaruit zij geput zijn: B = Batalo de l' vivo; E = Esprimo de sentoj en Esperanto; F = La Faraono (I, II en III); H = Hamleto; FK = Fundamenta Krestomatio; M = Marta; R = Riĉa kaj sen mono; K = La Kapitanfilino.

Sta mij toe afscheid van Ŭ te nemen.

Ik zal een sabeldieren pels aantrekken.
Het werk raakt achter.

Haar adem stokte en zij begon te huilen.

Zij doen net zo goed hun best als vroeger.

Is het bezoek aan hen nog even groot?

Wat kan een mens beter doen dan vrolijk zijn?

Dus moeten zijn botten het ontgelden.

...mompelde de roeier binnensmonds.

En wat dit laatste betreft,

Geheel buiten zichzelf van lachen bij de gedachte, dat....

Wij denken er zo niet over.

Tot uw dienst.

Waarover erger jij je?

Op mijn eer.

De adel en het leger zijn een en hetzelfde.

Bij God.

Wat is er toch gebeurd?

Gij hadt mij niet moeten geloven.

Geloof niemand van onsl

Alsof de dood je op de hielen zat.

Als zij echter over één week niet komt of mij laat halen, maak ik mij los van de overeenkomst.

Permesu al mi preni la kuraĝon diri al vi adiaŭ. (H 56)

Mi metos sur min zibelan pelton. (H 85)

La laboro malfruigas. (M 108)

Ŝi perdis la spiron kaj komencis plori. (FI 85)

Liaj penadoj estas tiaj samaj, kiel antaŭe. (H 62)

Cu oni ilin vizitas ankoraŭ tiel same? (H 61)

Kion homo povas fari pli bonan, ol esti gaja? (H 85)

...., la doloro do promenas sur liaj ostoj. (FI 83)

.... murmuretis sub la nazo la remisto. (FI 85)

Kaj tuŝante tion ĉi lastan, (B 56)

Tute ekster si de rido ĉe la penso, ke.. (B 36)

Ni ne pensas tiel. ((H 58)

Al viaj servoj. (H 82)

Pro kio vi indignas? (H 127)

Per mia honoro. (H 64)

La nobelululoj kaj la armeo estas la sama unu. (FII 60)

Je Dio. (H 129)

Kio do fariĝis? (H 45)

Vi ne devis al mi kredi. (H 77)

Kredu al neniu el ni! (H 77)

Kvazaŭ vi kurus de la morto. (H 133)

Tamen se ŝi post unu semajno ne alvenos aŭ ne sendos peti min, mi liberigos min de la interkonsento. (M 32)

kvarona jaro aŭ kvaronjaro. Ĉe tio oni ne insistu, ke logike jaro ĉiam devas esti plena, do ne duona aŭ kvarona. Tiun hiperligokecon ni ne povas akcepti. Se ni akceptus in, ni ja ne povus paroli pri bruligita libro, ĉar bruligita libro logike jam ne estas libro, sed cindro, nek pri falsa guldeno, ĉar ĝi ja ne estas guldeno, sed imitaĵo.

Kaj kial „kvaronjaro” ne estas analoga al „centjaro”? Ĉar „kvaronjaro” signifas kvaronan jaron, kaj „centjaro” analoge signifus centan jaron, do ne centon da jaroj. La analogio do estas nur ŝajna, sed facile imagebla pro la fakto, ke „kvaron” kaj „cent” estas ambaŭ numeraloj. Sed la diferenco estas, ke „kvarono” kaj „kvarona” ambaŭ egale

signifas parton de io, kaj „cent” kaj „centa” respektive signifas nombron kaj rangordon.

Dem.: Por „pepernoten” ni trovas la tradukojn „spicnukoj” kaj „spicbuletoj”. Sed kiel ni traduku „kruidnootjes”?

Resp.: Laŭ nia scio oni nomas „pepernoten” ankaŭ „kruidnootjes”. Bonaj traduko ŝajnas al ni „spicbuletoj”, se oni komprenas el la rakontas, ke tiuj buletoj konsistas el ia kuko. Por eviti eventualan miskomprenon oni povas en la komenco diri „spickukbuletoj”.

Tamen, la nomon „kruidnootjes” oni donas ankaŭ al „muskaatnoten”. Ili nomiĝas „muskatnukoj”, kaj la arbo sur kiu ili kreskas „miristiko”.

TRA NIA LITERATURO

DIABLET' EN LA BOTEL' de R. L. Stevenson. El la angla de J. Seka.

Prezo: 1 germ. marko.

Ĉi tiu verketo estas lingve aprobata de Lingva Sekcio de Germana Esp. Asocio. Ni tamen supozas, ke en tiu sekcio ne estas alilingvanoj; ĉar tiukaze multaj eraroj certe estus evititaj. Tio estas bedaŭrinda, ĉar la traduko mem ne estas malbona, sed en tia malgranda verko ni trovis sufiĉe da kritikindaĵoj.

En la rakonto la ĉefpersonoj ligas sin kun diableto loĝanta en botelo. Nur post vendo de la botelo ili povos savi sian animon. Per ruzo la edzino de la posedanto aĉetas ĝin de sia edzo, tiel savante lin. Post tio tamen la edzo reakiras la botelon kaj fine ĉi fremdulo perforte scias alproprigi ĝin. Do saviĝas ambaŭ ĉefpersonoj.

Ĝenas la ofta metado de la adjektivo kaj adverbo malantaŭ la resp. substantivojn kaj verbojn. Antaŭ multaj konjunkcioj mankas la komo.

Neonsekvence aplikitaj estas la jenaj formoj: „*kiom feliĉaj*” (9) — „*tiel klara*” (10); „*dum li venis* (9) — „*dum kiam li pleniĝis*” (24); „*Germanlando*” (5) — „*Belgio*” (7); „*Kaeven*” (27) — „*Motui-ti-n*” (34).

Gramatike kritikindaj estas: „*ŝajnas necese*” (5); „*ekzistas jes libroj*” (6); „*la Pacifiko*” (11); „*blanka kiel lakto*” (12); „*Tutmondo*” (= tuta mondo) (24); „*plenbuŝoj*” (= buŝplenoj) (34); „*ilia rajdado kaj veturado*” (34).

Sangindaj estas: „*skribita*” (= verkita) (7); „*rigardu*” (= klopodu), ĉu vi povas ĝin rompi” (11); „*mi povos daŭri* (= resti) sen domo” (12); „*sed morgaŭ* (= la sekvintan tagon) hele mateniĝis” (21); „*ŝi ekokulis reen*” (= malantaŭen) (23); „*tien kaj reen*” (= returne) (24); „*malvento*” (= senventeco) (27); „*mi maldiru* (= prisilentu) lian nomon” (27); „*alie*” (= se ne) (12).

Kunmetitaj vortoj, kiaj „*kalvekapa*” estas malĝuste interligitaj. La signifo estas: kiu havas kalvan kapon, do: kalvakapa (10). Same estas: „*tutesence, nigrebarba, novespeca*” k.t.p.

Ĉe la fino de la verketo troviĝas klariga vortlisto, kiu estas bona helpilo ĉe la nekonaataj vortoj.

Pluraj bonaj stilaĵoj estas troveblaj, kiaj: „*mi metus la manon en fajron por nenio*” (19); „*kaj nun vidas rompiĝi ĉiujn siajn esperojn, en eko, kiel pecon da vitro*” (25); „*la vortoj formortis sur la langvo de Kaeve*” (29); „*de la kapharjoj ĝis la pieddunĝoj*” (31), k.t.p. J. van Scheepen.

Daŭrigo

NEOLOGISMOJ

komponentoj x, komponaĵoj, samensteltende delen, krachten)

komputi, nombri (tellen)

krescendo, voĉa plifortiĝo

kriĉi, akcipitre kriegi (krijzen)

kviĉi x, pepegi (luidruchtig sjilpen)

langvora, anim- aŭ korpmalsteĉiĝo (slap, kwijnend, mat)

lanta x, malrapida (langzaam)

mandrelo, speco de simio (mandril)

manlihero x, manlicher-fusilo

mentaleco, eco rilatanta la menson (mentaliteit)

mimikrio, imita konformiĝo de bestoj kaj plantoj al la ĉirkaŭaĵo (mimicry)

monitoro, speco de militŝipo (monitor)

morna x, malĝoje premata (somber, droefgeestig, dof)

odekolono (eau de cologne)

obskura x, malluma (obsuur)

olda x, maljuna (oud)

orgojlo x, malhumila fierego (hoogmoed)

pansi, ĝarni per bandaĝo (verbinden)

pigra x, maldiligenta (lui)

pojno, manartiko (pols)

poka x, malmulta (weinig)

poltrono, -e, v, malheroo -e (lafaard, lafhartig)

povra x, kompatinda (arm)

predo x, militakiraĵo, rabakiro (prooi)

razio (razzia)

refreno, rekantaĵo (refrein)

rezidi, kutime restadi (resideren)

rilaksa, malsstreĉa (slap, ontspannen)

robusta, fortstatura (robust)

sibilo, antaŭdiristino (sybille)

sinki, malrapide malsupreniri, fali (zinken, neerzijgen)

sinapismo, sinapa kataplasmo (mosterdpap, pleister)

skabelo, piedbeto

sombra x, malhela (somber, betrokken)

spektatoro x, spektanto, rigardanto, observanto

spinedo, antikva piano (spinet)

spuro, postesigno (spoor)

stalono x, virĉevalo (hengst)

sterila, nefekunda, senĝerma (steriel)

stinki x, malbonodori (stinken)

suspiri, ĝemspiri, sopirspiri (zuchten, smachten)

ŝereo, speco de vino (sherry)

tarda x, malfrua (laat)

